

Belgio: dividebla nur post generacioj



**Piramido-
problemo**

**Kiom
valoras mortigito?**

**Dilma Rousseff:
lulita de la antaŭulo**



LA GRAFO DE MONTE- KRISTO

**La vivoverko de
Alexandre Dumas kaj
la vivoverko de tradukisto Daniel Moirand**

Oni kutimas konsideri la libron *La Grafo de Monte-Kristo* kiel la ĉefverkon de A. Dumas. Ĝi estas vere fascina. Ĉiu plia (re)legado ebligas trovi ion novan, novan interpretadon, novan aspekton ...

La ĉefrolanto, Edmond Dantès, perfidita pro kalumnia denunco, estas enkarcerigita dum dek kvar jaroj en la malliberejo de la kastelo If, sur insuleto apud Marsejlo. Tie li konatiĝas kaj amikiĝas kun sammalliberejano, abato Faria, kiu transdonas al li la sekreton pri la loko de kaŝita trezoro. Post lia forfuĝo el la malliberejo kaj rekupero de la trezoro, la strebo de lia tuta vivo, danke al supera riĉeco kaj inteligenteco, estas venĝi sin kontraŭ tiuj, kiuj atencis lian juncon, lian feliĉon.

A. DUMAS



**LA GRAFO DE
MONTE-
KRISTO**

FEL

Eldonjaro: 2010

Tradicia bindita versio (en 2 volumoj): formato 135 x 210 mm, pezo 1333 g, 1184 paĝoj, ISBN: 978-90-77066-43-0; prezo ĉe FEL: 96 EUR + afranko.

Kiel e-libro (ePub, Mobi aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 32 EUR

Lulita de la antaŭulo

10



La lastan dimanĉon de oktobro 2010 la brazila civitanaro kreis historion: la unuan fojon elektigis virino al la plej alta respublika posteno, tiu de prezidanto. Ŝia nomo: Dilma Rousseff [diŭma husef].



14

Junaj arbitoj – post 70 jaroj

Antaŭ 70 jaroj, en oktobro 1940, judoj de la regionoj Palatinato kaj Badeno en la sud-okcidenta Germanio devis paki ene de du horoj dokumentojn, vestaĵojn kaj nutraĵojn por trajnvojaĝo ien ajn. Poste la naziaj surlokaj respondeculoj fiere raportis, ke iliaj regionoj estas „senjudaj”.

El muzeo per muso

16

La Naskiĝo de Venera kaj la Printempo de Botticelli, la Anunĉiaco de Leonardo da Vinci, la Bapto de Kristo de la sama artisto kaj Verrocchio, la Bakĥo de Caravaggio, la Portreto de Eleonoro de Toledo de Bronzino: ne multas tiuj, kiuj en sia vivo sukcesis admiri de proksime ĉiujn ĉi majstraĵojn de la Renesanco. Sed bedaŭrinde la ekonomia krizo igas neloga tre oftan vojaĝadon al Italio.

politiko

KOMUNISMO	9
Piramido-problemo	
NIĜERIO	9
Sekto sekurecon subfosas	
BRAZILIO	10
Lulita de la antaŭulo	
GVINEO	11
Nova prezidanto, novaj ŝancoj	
SLOVENIO	11
Unua nigra-haŭta „ĉefo”	
ALBANIO	11
Edziĝo esperiga	
BELGIO	12
Dividebla nur post generacioj	
TERORISMO	12
Mitralo en la kuirejo	

moderna vivo

SPORTO	13
Futbalejo – aŭ ĉu batalejo?	
KOMPENSADO	13
Kiom valoras mortigito?	
MUZIKO	14
Junaj arbitoj – post 70 jaroj	
HOMAJ RILATOJ	15
Ami, estimi kaj kokri	
TRANSPORTO	16
„Magia” tapiŝo	
RENESENCO	16
El muzeo per muso	
INUNDOJ	17
Kompensi mizeron ne eblas	

spirita vivo

OPINIO	18
Einstein havis okulojn malfermitajn	

rakontoj

Georgo	19
--------------	----

libroj

Surpriza proverbaro	21
Belaj figoj post Pasko	22

eseo

HIPOTEZO	24
La origino de la homaj lingvoj	

serĉo kaj satiro

KIPRO	26
Terasa apartamento	

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› Aktuale: parolas posteulo	7
› El mia vidpunkto	8
› Anoncetoj	27

► Rekto al la eldonoj ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- > El Usono per ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be.
- > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	25	28	15	5,5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9,5	15
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5,5	9
Brazilo	EUR	25	28	15	5,5	9
Britio	GBP	44	47	26,4	5	7
Bulgario	EUR	25	28	15	5,5	9
Ĉeĥio	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	41	67
Estonio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Grekio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Hispanio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Hungario	HUF	8100	8900	4860	1530	2500
Irlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Israelo	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1200
Kanado	CAD	78	84	46,8	9	14
Kipro	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Koreio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Kostariko	EUR	25	28	15	5,5	9
Kroatio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Latvio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Litovio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Malto	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Norvegio	NOK	430	460	258	48	71
Nov-Zelando	NZD	105	111	63	11,5	18
Pollando	PLZ	115	126	69	23	36
Portugallio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Rusio	EUR	25	28	15	5,5	9
Serbio	EUR	25	28	15	5,5	9
Slovakio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Slovenio	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Sud-Afriko	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Svedio	SEK	499	543	299,4	56	85
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	14
Usono	USD	78	82	46,8	8	13

► aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstralio:** Libro servo de AEA, 4/23 Albue-
ra Street, Battery Point Tas 7004, Australia.
Reto: libro servo@esperanto.org.au.
- > **Aŭstria:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38,
3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744.
Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei
140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43).
Reto: financo@fel.esperanto.be.
- > **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo,
Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia.
Reto: bel@esperanto.org.br.
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de
Britio, Esperanto House, Station Road, Bar-
laston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio.
Reto: eab@esperanto-gb.org.
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III.,
290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto
de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100,
variab. symbol por gazeto Monato: 07001.
Reto: cea.polnický@quick.cz.
- > **Dana:** Revuservo de DEA, Arne Casper,
Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 Køben-
havn Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45
21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- > **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-
93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- > **Finnia:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de
Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530
Helsinki, Finnlando.
Reto: eafofficejo@esperanto.fi.
- > **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis,
rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D
Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- > **Germanaj:**
> Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer
Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank
Hoya, Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90)
Reto: robo.espero@acn-mail.de.
- > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303
Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk
91856-676 (BLZ 54510067)).
Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
- > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang Schwan-
zer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz.
Reto: wolfgang.schwanzel@esperanto.de.
- > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio,
Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa
d'Enginyers, 3025-0002-47-1433276794).
Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- > **Hungara:** AbonaSoft Bt,
HU-1093 Budapest, Bakáts u. 1/3 III.1.
Reto: abonasoft@gmail.com.
- > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9
Templeogue Wood, Dublin 12.
Reto: noviresp@eircom.net.
- > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio,
Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík.
Reto: esperant@ismennt.is.
- > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via
Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.:
37312204). Reto: fesp.it@infinito.it.
- > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto,
Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162.
esperanto@jei.or.jp.
- > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a
Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington,
Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: yan@storm.ca.
- > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601
ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro

- Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860
Rete: esperanto@saluton.net.
- > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981,
1000 San José. Reto: miaumiau1@ice.co.cr
- > **Kroata:** Kroatia Esperantista Unuiĝo, Sveti
Duh 130, HR-10000 Zagreb.
Reto: marija.belosevic@zg.t-com.hr
- > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas
35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371
6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- > **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187,
LT-01003 Vilnius-C, Litovio.
Reto: laimiuslt@gmail.com.
- > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394
Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111 0089
3612 0000). Reto: wickler.albert@gmx.net
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg
176, NL-3015 BJ Rotterdam.
Reto: uea@inter.nl.net.
- > **Norvegia:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf
Schous vei 18, 0572 Oslo 5.
Reto: inform@esperanto.no.
- > **Nov-Zelanda:** David Dewar, 28 Coventry
Way, Long Bay, North Shore City 0630.
Reto: gddewar@ihug.co.nz
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117
m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-
1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV
O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio,
R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239
Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
- > **Ruslandaj:**
> Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-
grad, ab. ja. 1248, Ruslando.
Reto: sezonoj@gazinter.net.
- > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006
Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964.
Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.:
42301.810.3.0018.0084867.
Reto: mikaelo@km.ru.
- > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljković
14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel.
+381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.rs.
- > **Slovaka:** Stano Marček, Zvolenská 15/11,
SK-3601 Martin. Reto: marcek@esperanto.sk.
- > **Slovenaj:**
> Višnja Branković, Via Parini 5, I-34129
Trieste. Reto: visnja.brankovic@os.htnet.hr.
- > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130,
HR-10000 Zagreb.
Reto: marija.belosevic@zg.t-com.hr
- > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview
Crescent, Milnerton Ridge, 7441.
Reto: beckford@telkomsa.net.
- > **Svedaj:**
> Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Espe-
ranto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123
52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@telia.com.
- > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet
Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35
Hörby, Svedio.
Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
- > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleidorn
6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7
Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
- > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito,
CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1
510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Nova ĉefredaktoro



Dum 30 jaroj, kun kelkara interrompo, mi estis ĉefredaktoro de tiu ĉi magazino, kiun mi fondis kun Torben Kehlet. Nun mi estas 70-jara kaj sentas la problemojn de maljuniĝo.

Kvankam mia sanstato estas relative stabila, post bicikla akcidento antaŭ kvar jaroj, pro kiu rompiĝis vertebro, mi suferas kronikajn dorsdolorojn. Krome post naŭ man-operacioj mi pli kaj pli malbone povas manipuli miajn fingrojn, ekzemple dum tajpado. Do estas tempo rezigni pri la posteno de ĉefredaktoro.

Mi estas tre feliĉa, ke ni trovis tre kompetentan posteulon por tiu ĉi grava posteno. La 61-jara Paul Gubbins ne nur estas renoma dramverkisto, kiu gajnis multajn premiojn en belartaj konkursoj de Universala Esperanto-Asocio, kaj membro de la Akademio de Esperanto, sed – por ni precipe grave – ankaŭ universitata docento pri ĵurnalismo. Dum pluraj jaroj li krome sukcese gvidis la korespondan kurson de la tiama Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio. Kaj vi

ja ĉiuj konas lin kiel inteligentan aŭtoron de nia revuo kaj kiel redaktoron de la rubrikoj Politiko kaj Moderna vivo. Do ne povas esti dubo pri la kvalitoj de la sperta ĵurnalisto por la nova posteno. Sur sekva paĝo li mem prezentas sin al vi.

Do trankvile mi povas rezigni pri mia posteno, ĉar mi scias, ke mia amiko Paul Gubbins garantias kontinuecon de tiu ĉi prestiĝa magazino. Mi kompreneble dankas al niaj multaj fidelaj kunlaborantoj, aŭtoroj kaj redaktoroj, kaj precipe al la eldonejo de Flandra Esperanto-Ligo kaj ties skipo kun nia lerta redakcia sekretario Paul Peeraerts ĉe la pinto. Ĉiam ili fideinde laboris por nia revuo. Kaj kompreneble mi tutkore dankas al vi ĉiuj, niaj fidelaj abonantoj kaj legantoj, el kiuj ne malmultaj akompanas nin ekde la unua jaro. Mi esperas, ke vi same simpatie subtenos nian novan ĉefredaktoron, al kiu mi deziras ĉion bonan por la estonteco. Al vi mi deziras daŭran plezuron dum legado. Mi ja iom malĝoje, tamen kontente adiaŭas vin. Fartu bone!

Sincere via

Stefan Maul

Stefan Maul



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 32a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda kaj komputila (MPD) versioj de MONATO por blinduloj, mendu ilin pagante 15,40 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro g; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

sociaj retejoj:

- Twitter: @FEL_Antverpeno
- Facebook: Flandra Esperanto-Ligo
- Iperity: http://flandra_esperanto-ligo.ipernity.com

ĉefredaktoro:

Paul Gubbins, 3 Arden Court, Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: chefredaktoro@monato.net.

revizianto:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vispaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio.

Rete: enigmoj@monato.net.

- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redak-toro, depende de la temo.

- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzel-langasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.

- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio. CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.

- **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.

- **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono. Telefono 440-646-1482. Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzonj oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

- **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.

- **Medio:** Slezák Tamás, Damjanich u.12, HU-9200 Mosonmagyaróvár, Hungario. Rete: medio@monato.net.

- **Moderna vivo:** Paul Gubbins,

3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.

- **Noveloj kaj Poezio:** sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: noveloj@monato.net.

- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.

- **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.

- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net.

- **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: sporto@monato.net.

- **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzel-langasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.



Donackupono

Donaco por via korespondamiko?

Donaco por la amikoj de Pasporta Servo
kiuj tiel afable gastigis vin?

Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **12,25 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **24,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **49 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponojn nun ĉe
Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen,
Belgio aŭ rete ĉe monato@fel.esperanto.be.

Parado de toleremo (4)

Nia mondo alfrontas centojn da problemoj pli maltrankviligaj ol iu geja aŭ karnavala parado. Kvankam mi ne samopinias kun Atanasije Marjanović (MONATO 2010/10, p. 6) kaj havas pli mildajn poziciojn pri tiu temo, ŝajnas al mi justa, ke estas defendata ĉies rajto esprimi la propran opinion. Tiu ĉi revuo estas „internacia magazino sendependa“, kaj ĝia rubriko *Leteroj* estas „malferma por koncizaj reagoj pri artikoloj aperintaj“. Tio signifas, ke ĉiuj legantoj (dekstruloj kaj maldekstruloj, kredantoj kaj nekredantoj, samseksemuloj kaj malsamseksemuloj) rajtas havi sian vidpunkton, eĉ se malpopularen, pri iu ajn temo.

Esperanto – oni legas en multaj broŝuretoj – estas lingvo je dispo de la tuta homaro, uzebla por ĉiuj celoj de ĉiuj homoj: jen ĝiaj beleco kaj unikeco. Oni povas per Esperanto esprimi iun ajn konvinkon kaj pridiskuti ĝin kun aliaj personoj el la tuta mondo.

Roberto PIGRO
Kipro

Gajni kontraŭ riĉegaj kontraŭuloj

La artikolo de Zlatko Tišljar *Demokratio en postdemokratia socio* (MONATO 2010/12, p. 10) estas tre interesa, sed la vero ne ĉiam estas tia.

Ni havis voĉdonon por guberniestro ĉi tie en Kalifornio (ĉirkaŭ 38 milionoj da loĝantoj), kaj la kandidato, kiu elspezis plej multe, malgajnis. Industriistino Meg Whitman elspezis pli ol 144 milionojn da usonaj dolaroj de sia propra mono plus pliajn milionojn el aliaj fontoj. Ŝia ĉefa kontraŭulo, Jerry Brown, elspezis sume 24 milionojn da dolaroj kaj ricevis 54 % de la voĉoj, dum Whitman ricevis 41 %. Whitman elspezis ĉirkaŭ 36 usonajn dolarojn por ĉiu voĉo, kiun ŝi ricevis, dum Brown, la gajninto, elspezis nur ĉirkaŭ 4,50 por ĉiu ricevita voĉo. Ja eblas gajni kontraŭ riĉegaj kontraŭuloj.

Tom RUBINSTEIN
Kalifornio, Usono

Parolas posteulo

Stefan Maul sinonimas kun MONATO. Stefan kunfondis, formis kaj dum jardekoj ame flegas nian magazinon. Ĉefe legantoj, sed ankaŭ ĉiuj kunlaborantoj, ŝuldas al li multon. Sinceran dankon pro magazino unika en nia verda mondo: magazino, kiu raportas ne pri, sed per Esperanto, kiu

intence turnas sin for de iufoje febra esperanta mondeto al iufoje same febra, sed multe pli vasta ekstera mondo. Stefan dediĉis sin multflanke al Esperanto, interalie kiel aŭtoro, poeto, akademiano, sed sendube MONATO fariĝos lia monumento.

Nun, pro bonaj kaj kompreneblaj kialoj, Stefan decidis rezigni pri la

ĉefredaktoraj devoj. Ilin li transdonas al mi. Granda honoro, pri kiu mi ne tute certas, ĉu mi indas: la magazino perdas profesion, ĝisostan ĵurnaliston kaj akiras maksimume duonprofesion. Jes, mi instruas ĵurnalismen ĉe brita universitato kaj trejniĝis kiel ĵurnalisto antaŭ pli ol 30 jaroj; intertempe, tamen, kaj plejparte, mi perlaboris mian ĉiutagan panon, instruante universitatnivele la germanan.


Principoj

Sed, dum tiu ĉi periodo, mi kontribuis al MONATO, artikolante kaj, iom poste, redaktante la rubrikojn *Politiko* kaj *Moderna vivo*. La magazino ebligis al mi, lingvo-instruisto, reteni kontakton kun la ĵurnalismo. Samtempe mi rekonis la valoron de MONATO, pli kaj pli respektante ties principojn, kiujn nun kiel ĉefredaktoro mi defendos.

Kio pri la estonteco? Ŝanĝi nian magazinon mi ne volas; laŭeble plifortigi, jes. Por tio mi bezonas interalie la helpon de legantoj: legantoj, ekzemple, el landoj, kiuj malofte reprezentigas inter la kovriloj de MONATO. Legantoj pretaj verki pri protestoj en Francio kontraŭ altigo de la pensiaĝo; pri la dekstrema tiel nomata tefesta partio en Usono; pri la provoj de Putin denove prezidantiĝi; pri la burleskaĵoj de Berlusconi ktp ktp. Ne mankas temoj, sed ie-tie mankas verkantoj por kvante kaj kvalite ŝveligi la enhavon de niaj rubrikoj.

Tiamaniere, kun via helpo, kun la subteno de Flandra Esperanto-Ligo, ni povos daŭrigi la MONATO-tradicion grandparte establitan de Stefan Maul. Humile, iom nerveze, mi tamen antaŭĝuas sukcesan kaj fruktodonan kunlaboron.

Paul GUBBINS



Ekologio paradokse

Stefan MAUL



Estis bona ideo: biokarburado por aŭtomobiloj. Benzino de agroj anstataŭ el bortruoj utilu al la klimato kaj reduktu ekspluaton de naftorezervoj. Sed kio aperas unuavide mediprotekta, je pli preciza esploro montriĝas foje malutila por la medio. Kiu zorgeme studas la efikojn de benzino el kolzo, palmoleo aŭ sukerkano, rapide devas konkludi, ke biobenzino tute ne estas ekologia.

Ĉu klimatprotekto?

La komisiono de Eŭropa Unio (EU) preskribis jam antaŭ kelkaj jaroj aldoni en benzinon kvin procentojn da etanolo. Nun EU altigis la aldonajn al dek procentoj. La germana registaro decidis plenumi tiun ĉi celon: ekde tiu ĉi jaro oni ofertas benzinon „E-10” (etanolo 10); benzino „E-5” haveblos nur ĝis 2013 en Germanio. Protestis jam maljunuloj, ĉar motoroj de malnovaj aŭtomobiloj parte ne povas digesti la novan benzinon; ili do devus aĉeti novajn aŭtojn aŭ novajn motorojn – por pensiuloj kun iliaj malaltaj enspezoj ofte ne pageblajn. La germana mediministro laŭdis la novan benzinon kiel „efikan kontribuon por klimatoprotekto”. Sed ŝajnas ke tiu ĉi aserto estis iom erara.

Nun por la unua fojo fakuloj elkalkulis, kiom efikas la dek-procenta celo de EU. Se ĝis 2020 dekonon de la benzino originos el plantoj, tio pli multe damaĝos la klimaton ol uzado de fosiliaj karburadoj. La fakuloj do konkludas, ke tiom da etanolo persigas la EU-celon. Tio tamen aperas paradoksa, ĉar EU preskribas ankaŭ, ke oni devas produkti biobenzinon mediprotekte. Sed la kreskanta bezono de etanolo devigas agrikulturistojn akceli kultivadon de plantoj. Ili povas aŭ pliintensigi rikoltojn sur la agroj

– tio kostas sterkon kaj akvon, kio damaĝas la medion – aŭ ili ekstermas arbarojn, faras agrojn el herbejoj aŭ novaloj, por havi sufiĉe da terenoj por produktado de etanolo. Sed kiu forŝegas arbojn kaj heĝojn, tiu produktas karbondioksidon. Do estiĝas eĉ pli da damaĝa gaso. Per aliaj vortoj: biobenzino estas pli noca por la klimato ol ordinara benzino.

Ignorataj avertoj

Tiu ĉi studaĵo ne estas la unua averto pri malbonaj faktoroj de biokarburado, ĉar jam ofte sciencistoj atentigis pri malavantaĝoj. Sed oni ĉiam ignoris la avertojn de esploristoj kaj mediprotektantoj. Tro forta estis la lobio de agrikulturistoj, kiu provas egaligi la perdojn pro malaltaj prezoj por lakto kaj tritiko per produktado de plantoj por biobenzino. Tro fortaj estas ankaŭ la interesoj de agrar-industrio, kiu gajnas multan monon per etanolo el plantoj. Kaj ĝojas ankaŭ la automobil-industrio, kiu ne devas konstrui pli ŝparemajn motorojn.

Kion fari en tiu ĉi ekologie paradoksa situacio? Se ni ne volas komplete rezigni pri aŭtomobiloj, ni devas solvi la problemon per aliaj alternativaj energioj. Ekzemple ni povas esperi pri pli mediprotekta biobenzino el defalaĵoj de ligno kaj pajo; tion oni nun intensive esploras, sed tiuj karburadoj estas ankoraŭ tre kostaj kaj ne jam tute maturaj. Intertempe helpus iom, konstrui vere ŝparemajn motorojn. Sed precipe ni klopodu, produkti pli kaj pli multajn elektroaŭtojn, kondiĉe ke la elektro venas el renovigeblaj fontoj. Kaj fine ekzistas la plej mediprotekta eblo moviĝi: per bicikloj. Se ĉiuj uzus ilin almenaŭ por mallongaj vojoj, tio konsiderinde malŝarĝus nian medion – kaj utilis al nia sano. ■

KOMUNISMO

Piramido-problemo

Post la morto de la albana diktatoro komunista Enver Hoxha [hoĝa] en aprilo, 1985, posteuloj konstruis omaĝe al li, krom altan statuon bronzan, ankaŭ grandan imponan marmoran piramido-maŭzoleon.

La malriĉa lando elspezis ekscese por ambaŭ monumentoj dediĉitaj al eble la plej sovaĝa reprezentanto de totalisma reĝimo ie en la mondo. En 1991 la statuo, ĉe placo Skanderbeg en Tirano, estis faligita de 100 000 protestantoj.

Kulturo

Restis tamen la piramido, kiu fariĝis en la sekva demokrata ŝtato Internacia Centro de Kulturo. Poste la registaro decidis, ke ĝi fariĝu Nacia Teatro kaj Nacia Biblioteko. Tiucele estas disponigitaj ĉ. 5 milionoj da eŭroj.

Lastatempe, tamen, trafis la piramidon nova decido: ĝi estu detruita kaj, anstataŭe, estu konstruita nova domo de la parlamento, inaŭgurota okaze de la centjariĝo de la Sendependiĝo de Albanio en novembro 2012. La loko aparte



BARDHYL SELIMI

oportunas: la piramido staras apud la ĉefministrejo kaj aliaj ŝtataj konstruaĵoj.

Sovaĝeco

Tuj leviĝis kritikoj. Nostalgiajuloj pri komunismo, inkluzive la vidvinon de Hoxha, ankoraŭ vivantan, protestis, taksante la detruon sovaĝeco. Aliaj, pli raciaj, opiniis, ke la piramido estas arta monumento, kiu plibeligas la urbon, des pli, ĉar oni jam elspezis multon pro la piramido. Ankoraŭ aliaj, inkluzive de la ĉefministro Sali Berisha, diras, ke la piramido estu detruita, ĉar ĝi reprezentas lastan simbolon komunisman.

Ordinaraj albanoj, tamen, opinias, ke pli bone estus konstrui novan parlamenton aliloke anstataŭ detruiri la valorajn piramidan. Tiel eblus ŝpari monon por lernejoj, hospitaloj kaj sociaj servoj.

Nepras memori, ke komunismo ne malaperos pro detruado de ties simboloj. Same Hoxha, detruante preĝejojn kaj moskeojn en 1967, ne sukcesis elradikigi la religiemon de albanoj.

Bardhyl SELIMI



MIKO1808

Ĉu detruiri la lastan simbolon de komunisma erao? Jen dilemo frontanta al albanoj.

NIGĜERIO

Sekto sekurecon subfosas

Malgraŭ klopodoj de la niĝeria registaro „purigi” la landon kaj prezenti ĝin kiel sekuran ejon por internacia investado, plu subfosas la planon islamaj fundamentistoj.

En septembro anoj de la sekto *Boko Haram*, kiu oponas okcidentan edukadon, atakis policejon en la nord-niĝeria ŝtato Bauchi kaj liberigis pli ol 700 kaptitojn, simpatiantojn de la sekto, kaj mortigis tieajn sekurecajn agentojn. Ĝis nun, malgraŭ la sendo de soldatoj kaj policistoj de la federacia registaro, la grupo evitis kaptiĝon.

Klerulo

En oktobro sektanoj mortigis islaman klerulon, kiu aperis en radio-programo en la ŝtato Borno, kaj kiu kritikis la ideologion de *Boko Haram*. Du anoj alvenis per motorciklo al la hejmo de la klerulo kaj mortpafis lin kaj unu el liaj lernantoj.

Du tagojn poste la grupo atakis denove policejon, bruligis ĝin kaj mortigis du homojn. Nun oni timas, ke la atakoj heroldas veran batalon inter sektanoj kaj federaciaj sekurecaj agentoj.

Ofte, kiam sektanoj atakas, ili celas kristanojn kaj bruligas iliajn preĝejojn. Sed ankaŭ policejoj kaj hejmoj de kontraŭuloj ne estas sekuraj.

Princo Henriko OGUINYE/pg

BRAZILIO

Lulita de la antaŭulo

La lastan dimanĉon de oktobro 2010 la brazila civitanaro kreis historion: la unuan fojon elektiĝis virino al la plej alta respublika posteno, tiu de prezidanto. Ŝia nomo: Dilma Rousseff [diŭma husef].

Nuntempe en Brazilo ĉiu balotado okazas rekte kaj retkomputile. Do de la momento, kiam la lasta civitano tajpas la numeron de sia kandidato per la elektronika balotujo, ĝis la anonco de la rezulto, pasas maksimume du horoj. Tiu sistemo estas preta kalkuli 135 804 433 voĉdonaĵojn. Praktike ĉeestis 106 605 599, do 78,50 % el la civitanoj laŭleĝe kapablaj efektiviĝi sian demokratian rajton.

Venko

La venko de la kandidatino Dilma Rousseff estas ankaŭ la venko de prezidanto Lula da Silva. Ĉi tiu, proponinte ŝin kiel kandidaton por la Laborista Partio, prezidis Brazilon dum du sinsekvaj mandatoj. Laŭkonstitucie neniu rajtas trian sinsekvantan periodon, ĉu kiel prezidanto, ĉu ĉefestro de ŝtato, federacia distrikto aŭ municipo.

Aparte rimarkindas, ke Rousseff neniam antaŭe kandidatiĝis. Dum José Serra [ĵuzé seha], de la Brazila Socialdemokrata Partio, la ĉefa oponento, jam elektiĝis kiel deputito, senatano, urbestro kaj eĉ kiel estro de San-Paŭlo, la plej riĉa ŝtato de Brazilo, la kandidatino proponita de Lula okupis postenojn nur de la publika administracio.

Sindikato

Tiel finiĝas la erao Lula. Ekslaboristo ĉe la aŭtoindustrio, eksmigrolo el



Nova brazila prezidanto: Dilma Rousseff

la arida nord-oriento de Brazilo, Lula fariĝis la plej elstara sindikatisto de la tiel nomata ABC de San-Paŭlo (ABC: siglo de la urbonomoj Sankta Andreo, San-Bernardo kaj San-Kaetano).

La agado de Lula antaŭ la plej forta laborista movado de Brazilo efektive metis punktofinon al la militisma diktaturo (1964-1985). En 1980 li fondis la Laboristan Partion, per kiu li spertis politikan karieron de federacia deputito, antaŭ ol trafi la nacian prezidantecon (2003) – ne senpene, ĉar tio okazis post tri malsukcesaj provoj.

Ŝuldo

La politiko de Lula akcelis la brazilan ekonomion kaj samtempe ŝanĝis la vivon de 24 milionoj da mizeruloj, kiuj migris al la meza socia klaso. Rilate al la internacia ekonomio li solvis la gigantantan ŝuldon ĉe Internacia Mona Fonduso: nun Brazilo eĉ pretas prunti monon. Tiel kreiĝis neologismo: paralele al la formo milionulo aperas brazilionulo. Rimarkindas ankaŭ lia diplomatia klopodo por paco kaj en Sud-Ameriko (Venezuelo kaj Kolombio) kaj eĉ en Mez-Oriento (Palestino, Israelo kaj Irano).

La nova prezidanto, Dilma Rousseff, estas filino de la bulgara poeto Péter Russév, kiu iĝis brazila civitano kun la nomo Pedro Rousseff, kaj de la brazila

instruistino Dilma Jane Silva. Rousseff studis en tradicia katolika lernejo, sed la trankvilo de tiu ordinara familio ŝanĝiĝis pro la ŝtatrenverso en 1964.

Gerilo

En la unuaj jaroj de la militisma reĝimo la 19-jara Rousseff kontraŭbatalis la respublikon de generaloj per engaĝiĝo en urba gerilo. Arestite, ŝi estis torturita de la tiama politika polico kaj restis en malliberejo dum tri jaroj (1970-1972). Denove libera, ŝi studis ekonomikon kaj dediĉis sin al publika administrado. La nuna 62-jara kaj ĵus elektita prezidantino estis konata kiel kompetenta administrantino.

Antaŭ nelonge Rousseff sukcese batalis kontraŭ limfa kancero, kiu trafis ŝin tuj post la deklaro de Lula favore al ŝia kandidatiĝo. Ŝi kampanjis, promesante daŭrigi la politikon de Lula. Laŭ ŝi venis la horo por aboli mizeron en Brazilo. Por tio ne mankas al ŝi kuraĝo kaj kompetento.

Siavice Lula promesis ne ŝovi la barbon en la novan administracion. Li, kiu venkis la antaŭjuĝojn de la elito, kiu dubis pri la kompetenteco de simpla laboristo kiel respublikestro, rompis ankaŭ la antaŭjuĝon de reakciuloj pri la rolo de virino kiel ŝtatestro.

Jozefo LEJC

Nova prezidanto, novaj ŝancoj

Post pli ol tri prokrastoj la elekta komisiono en Gvineo okazigis duan prezidantan baloton. La kandidatoj estis tiuj, kiuj pleje sukcesis en la unua baloto, nome eksa ĉefministro Cellou Dallein Dialo kaj veterana opozicia kandidato Alpha Conde.

En la unua baloto prezentis sin 24 kandidatoj. Tiam Dialo ricevis ĉ. 30 % de la voĉoj kaj Conde 18 %, sed necesas pli ol 50 % por fariĝi prezidanto.

Temis pri la unua demokratia baloto en Gvineo post la sendependiĝo de Francio en 1958. Regis diversaj armeaj diktatoroj: dum 24 jaroj generalo Lasana Conte estris la landon kvazaŭ propran posedaĵon. Kiam li mortis en 2008, denove transprenis la registaron la armeo, subpremante la popolon.

Futbalejo

Pasintan septembron mortigis soldatoj pli ol 2000 homojn, kiuj en la nacia futbalejo pace manifestaciis por demokratio. Protestis la internacia komunumo kaj la tiam ŝtatestro, vundita en murdatenco, fuĝis al Maroko. La sekva ŝtatestro promesis demokratiajn elektojn.

Venkis en la dua baloto Conde, la plej konata kritikanto de la antaŭa reĝimo. Tiel oni esperis, ke ĉesos la armea regado kaj revenos al Gvineo paco. Tamen post la anonco de la rezulto protestis subtenantoj de Dialo kaj en la sekvaj tumultoj mortis deko da homoj. Proklamita estas krizo-stato.

La elekta komisiono anoncis, ke venkis Conde per 52 % de la voĉoj. Internaciaj observantoj raportis, ke la



Alpha Conde - nova prezidanto de Gvineo.

elektoj, en kiuj rajtis partopreni gvineanoj loĝantaj ekster la landlimoj, senfraŭde okazis. Conde, 72-jaraĝa, nun havas mandaton por pacigi la landon kaj enkonduki veran ekonomian kaj politikan progreson.

Princo Henriko OGUINYE/pg

Unua nigra- haŭta „ĉefo”

Elektiĝis en la ĉemara slovena urbeto Piran la unua nigrahaŭta urbestro en iama komunista lando de Eŭropo. Peter Bossman, kuracisto, venkis en dua baloto-ciklo per 51,4 % de la voĉoj. Bossman, kies nomo anglalingve signifas „ĉefo”, naskiĝis en Ganao, studis medicinon en Slovakio kaj edziĝis al kroatino. Venkis Bossman, promesante plibonigi turismon en la urbo kaj tien enkonduki elektrajn aŭtobusetojn. Lia elekto kaŭzis grandan intereson en amaskomunikiloj tra la mondo. La nova urbestro, membro de la socialdemokrata partio de Slovenio, diris, ke lia sukceso signifas gravan venkon por la demokratio.

Zlatko TIŠLIAR

Edziĝo esperiga

Surpriza edziĝo de la albana socialista partiestro Edvin Rama, ankaŭ urbestro de la ĉefurbo Tirano, altiris la atenton de albanoj. Rama, 45-jaraĝa, jam du fojojn sensukcese edziĝinta, estas atakita de demokratoj pro sia privata vivo kaj eĉ nomita samseksemulo.

La publiko opinias, ke tiu ĉi tria edziĝo bone aŭguras por mildigi politikan streĉitecon en la lando. Socialistoj, 18 monatojn antaŭ landaj balotoj, rifuzis subteni en la parlamento reformojn. Tamen unu tagon post la nuptofesto Rama partoprenis kunvenon alvokita de ĉefministro Berisha por diskuti interpartian konsenton rilate tiujn leĝojn.

Bardhyl SELIMI

TERORISMO

Mitralo en la kuirejo

Kiam la germana ministro pri internaj aferoj, Thomas de Maizière, kristandemokrato, avertis en novembro, ke Germanio troviĝas antaŭ atako de islamismaj ekstremistoj, la polico gardis laŭsupoze endanĝerigitajn lokojn kiel stacidomojn kaj flughavenojn.

En la federacia lando Berlino Ehrhart Körting, la ministro pri berlinaj internaj aferoj, kaj socialdemokrato, ne volis aspekti malpli zorgema ol la konkurenccpartia ŝtata ministro.

Instancoj

Körting siaflanke avertis la publikon, maksimume laŭvorte, tiel: „Se ni en la najbaraĵo rimarkas ion, kiel jen subite estas lokitaj tri iom strange aspektantaj homoj, kiuj neniam vidigas sin aŭ simile, kaj kiuj parolas la araban aŭ fremdan lingvon, kiun ni ne komprenas, tiam oni pripensu, mi kredas, ke oni informu la ŝtatajn instancojn, kio tie okazas.”

Pro tiu eldiro la politikisto rikoltis abundajn reagojn, ofendiĝojn, indigniĝojn kaj mokegojn. Kial ĝuste tri personoj? Kiam homo aspektas strange? Kiu germano tuj ekkonas la araban lingvon? Kiun fremdan lingvojn „ni” ne komprenas? Kio okazas ĉe tri homoj, kiuj ne vidigas sin?

Fremduloj

Ĉu bavaro en tipa kostumo en Berlino ne aspektas strange, kaŝas sin precipe en tribaj bierdrinkejoj, parolas lingvon, kiun prusoj ne komprenas? Kaj se tiaj fremduloj aperas eĉ triope, okupiĝante pri la hejma ŝatokupo, la sekreta fenestrumado (kuraĝa noktomeza tagrim-pado de fenestro al la ĉambro de amantino)? Ĉu teroristoj?

Poste Körting per „ĝustigo” koncedis, ke la eldiroj estis „eble malkonvenaj”.

Li klopodis precizigi sian alvokon: „Mi parolis pri seriozaj indikoj pri armiloj aŭ suspektindaj pakajoj, ne pri denunciado. Ne temas pri denunciado, se oni vokas la policon, vidinte novajn najbarojn umantajn kun mitralo en la kuirejo. Tio cetere validas ankaŭ por muzulmanoj en Berlino. Kiu hazarde aŭskultas en moskeo suspektindan interparoladon, tuj anoncu sin ĉe la sekurigaj instancoj.”

Kolegoj

Ankaŭ tiuj „klarigoj” ricevis la saman akcepton de la publiko kaj ne povis

forviŝi la impreson, ke tiu ĉi funkciulo ne estas kapabla efike agi en kriza situacio. Kaj li vekas suspekton ankaŭ kontraŭ la kolegoj, kiuj pli lerte povas komuniki (aŭ kaŝi) siajn ideojn.

Estas malfacile distingi inter insida denunciado kaj informo al la polico, kiu povas eviti krimon. Pli malfacile estas taksi homon laŭ aspekto, konduto kaj lingvo. Plej malfacile, almenaŭ por politikistoj, ŝajnas esti komprenigi sin nemiskomprenoble, eĉ se ili parolas „nian” lingvon.

Franz-Georg RÖSSLER

BELGIO

Dividebla nur post generacioj

Post 150 tagoj da politikaj intertraktadoj por formi novan registaron ekzistas ankoraŭ grandega distanco inter la vidpunktoj de la komunumoj en Belgio. La 21an de novembro 2010 la flandra televido elsendis programon pri la divideblo de Belgio, se la komunumoj ne plu sukcesus trovi interkonsenton. Oni intervjuis 11 profesorojn pri la divideblo kaj ĝiaj praktikaj konsekvencoj. Ili konkludis ĉefe, ke la divido de Belgio en du aŭ tri ŝtatojn ja eblas, sed la realigo estos ege longdaŭra kaj multekosta. Neniu pensas pri revolucio, kaj do divido tia povos okazi nur per intertraktadoj.

Spekulado

Tiuj intertraktadoj tamen daŭrus eble dum generacioj, ĉar la vidpunktoj inter la komunumoj nun tiom diverĝas. En la transira periodo supozeble ĉiuj partneroj malriĉiĝus inter alie ankaŭ pro la riskoj de spekulado pro necerteco pri la estonteco.

Post la elsendo okazis debato kun reprezentantoj de ĉiuj iom gravaj flandraj kaj valonaj politikaj partioj. Evidentiĝis, ke nuntempe nur la ekstremisma *Vlaams Belang* deziras dividon. Aliaj partioj vidas kiel solan solvon pliajn intertraktadojn, kaj eventuale, sed evitende, novajn balotojn.

Ivo DURWAELE

Futbalejo – aŭ ĉu batalejo?



Ĉe la stadiono Luigi Ferraris [luiĝi feraris] en Ĝenovo, Italio, senpacience atendas infanoj kaj familioj sian „feston”: futbalmatĉon inter la itala nacia teamo kaj Serbio, nekutime okazontan en ilia urbo.

Ĉeestas multaj infanoj, kun gepatroj, la vesperon de la 12a de oktobro. En Italio oni ofte plendas, ke ne plu videblas familioj en la stadionoj, ke nepras reproksimigi etulojn al sporto. Tial iu sendis senpagajn biletojn al la lernejoj de la liguria havenurbo. Krom la italaj, ĉeestas ankaŭ kelkaj serbaj geknabetoj.

Albana flago

Ĉio ŝajnas preta, kiam zeloto serba ĵetas petardojn kaj aliajn objektojn sur la kampon. Televidaj kameraoj ripete

enkadrigas infanojn, kiuj ŝajne demandas sin aŭ gepatrojn, kial la matĉo ne komenciĝas. Videblas krome serbaj fanatikuloj, kiuj bruligas albanan flagon, dum aliaj levas la brakojn, specife la mezajn fingrojn, al la ĉielo, kriante aferojn, nekompreneblaj al la italoj.

Fine komenciĝas la matĉo 40 minutojn malfrue. Ĝi daŭras tamen nur kelkajn minutojn, dum kiuj timoplena arbitracianto sukcesis ne elpeli serban futbaliston pro faŭlo kaj tuj poste ne prifajfi klaran punŝoton por Italio. Kroma bengalfajraĵo ĵetita apud la itala golulo evidentiĝas, ke en tia etoso ne eblos ludi.

Nova trejnisto

Kompreni la kialojn de la tumultoj ne facilas. Povas esti, ke la huliganoj pardonis nek la novan trejniston pro freŝa malvenko kontraŭ Estonio, nek la golulon pro memgolo dum la sama matĉo. Krome en la stadiono legeblis tolstrio kun la vortoj: „Kosovo estas la koro de Serbio” (ne klaras, tamen, kiel tio rilatas al futbalo); alia tolstrio indikis (en perfekta itala), ke ĉiuj italoj estu sendataj „al la diablo”.

La huliganoj, ŝajne, venis al Ĝenovo ne pro la sporto sed por la tumultoj. Ili venis rekte el Beogrado, kie ili ĵus partoprenis manifestacion kontraŭ geja defilado.

Ili hejmeniras, fieraj pro sia nokto de granda disreviĝo. La infanoj, male, kun vizaĝoj malgajaj, forlasas la stadionon, forte premante la manojn de paĉjo kaj panjo.

Roberto PIGRO

Kiom valoras mortigito?



Juĝejo en Torino, Italio, devigis konstrufirmaon kompanse pagi al la familio de albana laboristo pereinta pro akcidento 64 000 eŭrojn. Protestis ne nur familianoj, sed ankaŭ italoj, inkluzive de juristoj, ĉar ricevis la familio de italo samkiale pereinta 300 000 eŭrojn. La juĝejo pravigis sian decidon per tio, ke la vivnivelo en Albanio pli malaltas ol en Italio.

Logike, do, se tiel mortus laboristo el Monako aŭ Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj, la juĝejo devigus la firmaon pagi tri- aŭ kvar-oble pli ol ĝi pagis al la itala familio. La juristoj konstatis, ke tiamaniere oni kuraĝigas lokajn entreprenistojn dungi enmigrintojn el malriĉaj landoj, ĉar okaze de akcidentoj ili povas pli avare kompensi.

Bardhyl SELIMI

MUZIKO

Junaj arbetoj – post 70 jaroj



*Alfred Cahn:
Muziko montru
pacan vojon
al interpolata
harmonio.*

Antaŭ 70 jaroj, en oktobro 1940, judoj de la regionoj Palatinato kaj Badeno en la sud-okcidenta Germanio devis paki ene de du horoj dokumentojn, vestaĵojn kaj nutraĵojn por trajnvojaĝo ien ajn. Poste la naziaj surlokaĵ respondeculoj fiere raportis, ke iliaj regionoj estas „senjudaj”.

La senrajtigitoj estis senditaj al la koncentrejo Gurs en la francaj Pireneoj, instalita jarojn antaŭe por rifuĝintoj de la hispana civitana milito. Tiam ĝi jam estis malplena kaj devis akcepti la perforte translokitaĵn sud-germanajn judojn. Tie preskaŭ neniel subtenis la judojn la francaj respondeculoj. Iom helpis kelkaj neregistaraj organizaĵoj. Tamen mortis multaj homoj.

Fuĝis

Unu el la kaptitoj jam provis eviti sorton tian. Alfred Cahn, 18-jarulo el Speyer, jam fuĝis al Nederlando, tiam ankoraŭ libera. Sed kiam ankaŭ tien venis germanaj trupoj, ili kaptis la junulon kaj transportis lin al Gurs. Tie li ren-

kontis la tien fortrenitajn hejmmregionajn samsortanojn.

Por mildigi la vivon en Gurs Cahn, entuziasma muzikisto, fondis junulan koruson. Tiamaniere li esperis konservi la memestimon de la kaptitoj en la koncentrejo. Plej fama fariĝis lia komponaĵo por trivoĉa infankoruso „Ni estas tre junaj arbetoj”. La teksto de la vienano Leopold Rauch metafore traktas la sorton de tiuj ĉi junuloj, kulminante en la apelacio al „kara ĝardenisto”: „Prenu nin en vian protekton, antaŭ ol estas tro malfrue!”

Elmigris

Por multaj kaptitoj jam estis tro malfrue. Ili perdis sian vivon en koncentrejoj en la okupata Pollando. Tamen Cahn mem, tra torturoj kaj aventuroj, transvivis. Poste li studis muzikon en Svislando, elmigris tiam al Usono, deĵoris profesie kiel instruisto pri muziko kaj tie vivas ĝis hodiaŭ.

Kiam en 2000 en lia hejmurbo Speyer oni oficiale (kaj unuafoje) memoris la okazintaĵojn de oktobro 1940, Cahn

estis honora gasto. Tiam junaj gimnazianoj de la apudreja katedralo-urbo kantis la „arbetoj-kanton” la unuan fojon en la hejmmregiono de la komponisto. Tiu mem gvidis ĝin dum la ripetado kun ĉiufanke grandaj emocioj.

Ornamis

Nun, post 70 jaroj, tiu ĉi kanto denove ornamis la memorigajn kunvenojn. Intertempe ekzistas pluraj versioj por diversaj muzikgrupoj. Kaj la kanto ne rangas nur kiel ornamaĵo, sed estas vivovera kontribuado liganta aŭtente kaj kortuŝe la pasintecon kun admona intenco.

La komponisto, naskiĝinta en 1922, ne plu povis entrepreni streĉan vojaĝon trans Atlantikon. Sekve la grandaj tiutemaj aranĝoj de la jaro 2010 en la Katolika Akademio de Speyer kaj la urbodomo de Manhajmo devis kontentiĝi sole pri la kanto.

Distingas

Sed la maksimumoj de Cahn ankoraŭ memorigas kaj daŭre restas validaj. Li distingas inter lando kaj kulpantoj: „Mi neniam malestimis mian hejmlandon Germanio, sed la nazian reĝimon. La juna generacio ne sentu sin kulpata.”

Krome li instigas al civila kuraĝo: „Ne preterrigardu! Helpu al la viktimoj, eĉ se vi devas suferi pro tio.” Kaj kiel muzikisto li rekomendas modelon por paca kunvivado: „La muziko montru al ni la vojon al vera harmonio kaj daŭra paco inter la popoloj.”

Franz-Georg RÖSSLER



La kanto „Ni estas tre junaj arbetoj” trafe tuŝis la sorton de junaj judoj en koncentrejoj.

Ĉefe kulpas la daŭra
disvastiĝo de la tiel
nomataj sociaj
retejoj



HOMAJ RILATOJ

Ami, estimi kaj kokri

La amo kaj la sindonemo de italoj al la familio estas proverbiaj. Tamen estas alia itala proverbo, ripetata de ĉiuj instruistoj pri algebro, laŭ kiu „matematiko ne estas opinio”. Kaj la ciferoj, neniam pli ol ĉi-foje, estas elokventaj.

Laŭ freŝa statistiko, 55 % de la edzoj kaj 45 % de la edzinoj trompis almenaŭ unufoje sian vivkunulon aŭ, pli precize, tiujn, al kiuj la plejparto solene promesis „ami, estimi kaj honoru, dum ĉiuj tagoj de mia vivo, en bonaj kaj malbonaj tagoj, en sano kaj malsano, ĝis la morto nin disigos”.

Konscienco

Aperinte fine de oktobro 2010, tiu ĉi novaĵo vaste eĥiĝis tra Italio. Oni subite ekkonsciis, ke, el kvar geedzaj paroj renkontataj en superbazaro, kamparo aŭ eĉ preĝejo, nur unu havas tute pu-

ran konsciencon. Ĉe la ceteraj tri paroj preskaŭ certe almenaŭ unu el la geedzoj kokris, se ne ambaŭ.

Senkompata kaj iel miriga estas analizo publikigita de la asocio de italiaj fakuloj pri geedzeco-juro. Ili rimarkis, ke la nombro de perfiduloj senĉese kreskas. Ĉefe kulpas la daŭra disvastiĝo de la tiel nomataj sociaj retejoj (kiel *Facebook*) kaj aliaj perretaj servoj. Ili kapblas provizi facile kaj senpage amikecojn tre apartajn.

Sperto

Certe ne temas pri fenomeno nur itala. Ekzistas ekzemple tutmonde sukcesa internacia retpaĝo rezervata al geedzoj serĉantaj eksteredzecan sperton. Rimarkindas, ke jam 90 000 italoj aliĝis al tiu ĉi servo. Cetere la malfidelula ĉefurbo ne estas Romo (kiu klasifikiĝas dua), sed

ties „rivalo” Milano.

El la studaĵo evidentiĝas, ke 60 perfidoj el 100 okazas tage, ĉe la laborejo aŭ dum nesuspektinda tagmanĝa paŭzo. Plej kutime temas pri simplaj eskapetoj, pli kaj pli ofte tolerataj (verŝajne, ĉar reciprokaj). Kelkfoje tamen naskiĝas ankaŭ stabilaj amrilatoj.

Aventuroj

Negravan rolon ludas ago. La mezuma trompanto estas 44-jara homo, kun kreskanta nombro de virinoj inklinaj al aventuroj aŭ veraj rilatoj kun partneroj pli junaj, kio ne plu estas tabua temo.

Ne mankas – sed ne abundas – geedzoj emaj al samseksaj rilatoj (7 % inter viroj kaj 4 % inter virinoj). Plejparte la averaĝa italo ankoraŭ preferas virinojn, laŭeble elektitajn el la edzinaj konatinoj kaj amikinoj. Virinoj rigardas interesate siajn kolegojn, sian personan trejniston aŭ instruiston pri skiado aŭ dancado.

Ke trompantoj sin kredas pli ruzaj ol siaj kunuloj, facile konstateblas. Sed tion neas la japana psikologo Satoshi Kanazawa. Liaj esploroj montras, ke kutime malfideluloj ne fidindas eĉ en la laborejo. Ili estas ankaŭ malpli inteligentaj.

Roberto PIGRO

TRANSPORTO

„Magia” tapiŝo



FLANDERS DRIVE

Pere de indukto oni povas ŝargi elektran dentobroson sen konektilo. En Belgio la saman metodon oni povas uzi por ŝargi la baterion de elektraj veturiloj.

Flanders Drive estas entrepreno kun subteno de la flandra registaro por helpi projektojn rilate al novaj trafikteknologioj. Ĝi nuntempe provizas vojpardon per indukta infrastrukturo en la pavimo: per tia sistemo aŭtoj povos ŝargiĝi dum veturado.

Evidente tio ege pligrandigos ilian veturoradiuson. La sistemo servos por publikaj kaj por privataj transportiloj. Por privataj aŭtoj oni krome ellaboras hejman ŝargotapiŝon. Sufiĉas veturi sur ĝin por ŝargi la bateriojn.

Ivo DURWAELE



Artikolojn pri la vivo
en via regiono
sendu al
moderna_vivo@monato.net

RENE SANCO

El muzeo per muso

La *Naskiĝo de Venera* kaj la *Printempo* de Botticelli, la *Anunzio* de Leonardo da Vinci, la *Bapto de Kristo* de la sama artisto kaj Verrocchio, la *Bakĥo* de Caravaggio, la *Portreto de Eleonoro de Toledo* de Bronzino: ne multas tiuj, kiuj en sia vivo sukcesis admiri de proksime ĉiujn ĉi majstraĵojn de la Renesanco. Sed bedaŭrinde la ekonomia krizo igas neloga tre oftan vojaĝadon al Italio.

Ĉu estas tamen amanto de arto, kiu ne farus ĉion ajn por fermi la okulojn kaj, tuj poste remalfermante ilin, troviĝi en Florenco, la naskiĝejo de renesancaj arto kaj arkitekturo, laŭeble ĉe ĝia eleganta kaj altvalora *Galleria degli Uffizi*?

Retpaĝaro

Bonan alternativon al teleportado proponas lastatempe la itala kompanio *Haltadefinizione* (www.haltadefinizione.com, itale, angle kaj hispane), entrepreno en la kadro de cifereca fotografado.

Ĉe sia retpaĝaro ĝi publikigis „je difino plej alta” plurajn el la plej famaj renesancaj ĉefverkoj.


„Se vi mem ne povas iri al ili, ilin portas ni al via hejmo”, estas la slogano de la kompanio. Kaj ne temas pri troigo pro tio, ke la artverkoj alvenas hejmen ne karne-oste, sed komputile-ekrane.

Detaloj

Tio ne estas malavantaĝo, ĉar la kvalito estas bonega, tiel ke kiu ajn povas distingi – pli bone ol en la muzeo mem (pro la deviga sekureco-distanco kaj la kutimaj kunpuŝiĝoj) – la plej etajn detalojn de pentraĵoj renomaj en la tuta mondo: kaj ĉio ĉi senpage kaj per nura alklako.

Se tamen oni volas kalkuli la florojn piede de la botičeli-a *Printempo* aŭ la perlojn, kiuj kaŝiĝas tra la hararo de la dukino Eleonoro de Toledo, oni rapidu. Post la 29a de januaro nepros pagi por aliri la servon.

Roberto PIGRO



LIQUEUR

Kompensi mizeron ne eblas

En novembro 2010 Flandrio suferis pro la plej gravaj inundoj de la lastaj 50 jaroj. Multaj civitanoj ricevis la impreson, ke inundoj tiaj estas nova fenomeno kaŭzita de tera varmiĝo. Esceptaj inundoj tamen regule ripetiga kun ritmo inter 50 ĝis 100 jaroj. Esploroj de la universitato de Leuven [leŭvn] pri cent jaroj ne montras rimarkindan ŝanĝiĝon en la pluvokvantoj.

Fakte kulpas pri la inundoj erara planado inter 1960 kaj 1980. Tiam oni rektigis meandrajn riverojn, provizante ilin per altaj digo, por ekuzi grundon, kiu antaŭe inundiĝis. Ĉie oni instalas kloakarojn kaj surmetis sur la teron be-

tonon.

Domoj

Rezulte, la akvo ne sorbiĝas en la tero kaj tro rapide kolektiĝas en la plej malaltaj terenoj. Krome en la sama periodo oni ekkonstruis novajn domojn en lokoj, kiuj antaŭe inundiĝis.

Post inundoj en 1994 kaj 1998 oni ekkonsciis pri la erara politiko. Depost tiu periodo oni konstruis basenojn por kolekti troan akvon, laŭeble eĉ rekreis meandrojn, instigis al instalado de privataj pluvobasenoj kaj provis malrapidigi la forfluon de troa pluvakvo.

Damaĝoj

Evidente la ĝisnunaj rimedoj ne sufiĉis. Ripari iamajn hidrologiajn erarojn estas ege malfacile. La nuna katastrofo sendube instigos al pliaj iniciatoj. Tamen inundoj en esceptaj okazoj ŝajnas neeviteblaj, ĉar malhelpi damaĝojn en plej ekstremaj situacioj postulus tro grandajn infrastrukturojn kaj tro multekostus.

Pro tio la belga leĝo devigas asekuojn de loĝejoj repagi la kostojn de naturkatastrofoj, do ankaŭ de inundoj. Bedaŭrinde la asekuoj ne povas kompensi la homan mizeron.

Ivo DURWAELE



ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
#Prezo ĉe FEL: 24,00 € +
afranko (tradicia bindita
versio), 14,40 € (ePub aŭ
Mobipocket).

Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandanino. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kapti en lanternan fajron, senbedaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturoj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo. Certe ĝi rangas apud la noveloj de Trevor Steele; kaj el la ĉefaj novelmajstroj de nia pasinteco, apud tiuj de Stellan Engholm kaj Ferenc Szilagy.”

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio;
www.retbutiko.net, retbutiko@retbutiko.net, aŭ ĉe via kutima librejo.

Einstein havis okulojn malfermitajn

La 28an de oktobro mortis en malsanulejo frato G. F. De Ruyver [rejvr]. Lia ĉi-suba kontribuo atingis la eldonejon de MONATO la 2an de novembro. Temas do pri la lasta aŭ unu el la lastaj verkoj de la forpasinto, kaj la fina frazo en la artikolo estas do kvazaŭ lia „lasta deziro” ...

En la Biblio troviĝas multaj tekstoj, kiuj komprenigas al ni, ke la vido de la naturo, de la tuta kreaĵaro, povas konduki nin al Dio. Jen du eksemplaroj.

„Mi gloras Vin (=Dio), ĉar mi estas mirinde kreita; Mirindaj estas Viaj kreitaĵoj” (Psalmaro 139:14).

„Benu la Sinjoron, vi, montoj kaj montetoj: laŭdu kaj gloru Lin por eter-

ne. Benu la Sinjoron, vi, ĉiuj plantoj de la tero: laŭdu kaj gloru Lin por eterne” (*Laŭdkanto* en Danielo 3:75-76).

La laŭdkanto de Danielo estis tre kara al Francisko de Asizo kaj lia fama *Sunkanto* sendube estis inspirita de ĝi. „Laŭdata Vi estas por nia fratino, nia patrino, la tero, kiu nin portas kaj nutras, kiu produktas ĉiaspecajn fruktojn, multkolorajn florojn kaj herbojn!” Malfermi-

taj estis la okuloj de Francisko, malfermitaj estis ankaŭ lia koro.

Rilate la kredon al Dio oni ofte citas eldirojn de famaj personoj. Tamen en ĉi tiu temo tiuj famuloj tute ne estas pli kompetentaj ol iu ajn el ni. Sed estas probable, ke iliaj belaj atestoj iom partoprenas en ilia famo.

Ni ĉiuj vidas ĉirkaŭ ni mirinde belan, nesondeblan mondon. En tio ni ĉiuj povas malkovri amoplenan agadon, klaran revelacion de ĉiopova Dio. Por tion fari oni ne bezonas erudicion, sed ja modestecon kaj sindonemon.

Estas vere, ke en tiu mondo regas ankaŭ multe da suferoj kaj malbonaĵoj. Parte tio ligiĝas kun ĉi tiu materia, vundebla kreaĵaro. Sed – kiel bedaŭrinde – plejparte la homaro kaŭzas tion al si mem. Tamen tiuj multaj malbonaĵoj ne povas al ni forgesigi la neeldireblan multon da bonaĵoj, kiuj parolas al ni pri amoplena, ĉiopova Dio.

Konsentite, ke la motivoj por kredi ne estas same klaraj kiel du plus du estas kvar. Sed ĝuste pro tio nia kredo estos tute persona, plene libera amoplena ekono de la kreinto.

Sekvas du atestoj, kiuj povas nin impresi, ne pro la famo de la persono, sed per si mem.

Iam Edison, vizitinte la Eiffelturon, skribis en la gastlibro: „Edison, kiu alte estimas kaj honoras ĉiujn inĝenierojn, inkluzive la bonan Dion.”

Kaj Einstein opiniis jene: „La plej bela sento, kiun homo povas sperti, estas la sento pri la mistero. Kiu neniam spertis tiun senton, kiu neniam prenis tempon por admire stari en raviĝo, plena de respekto, tiu homo estas kvazaŭ morta. Liaj okuloj estas fermitaj.” Ni funde pripensu ĉion ĉi.

Vi, kiu legis ĉi tiun artikolon, bonvolu ĝin diskonigi en via gepatra lingvo. Varman dankon.

G. F. DE RUYVER



Ni ĉiuj vidas ĉirkaŭ ni mirinde belan, nesondeblan mondon. En tio ni ĉiuj povas malkovri amoplenan agadon, klaran revelacion de ĉiopova Dio.

Georgo

Entuziasmajn vortojn mi legis en la tagĵurnalo de mia urbo Kluĵo en la artikolo far iu gastigata dirigento. Fakte la Filharmonio de Kluĵo invitis lin gvidi koncerton. Li estis hungaro elmigrinta al Londono, kie li kompletigis siajn muzikstudojn kaj komencis sian karieron de dirigento. Li nomiĝis Georgo. Lian familian nomon mi ne memoras – de tiam pasis tridek jaroj – kaj eĉ se mi memorus, ne emus citi ĝin. Tiutempe ĝi estis sufiĉe renoma, almenaŭ en Eŭropo.

Li entuziasme skribis pri mia urbo kaj pri ĉio, kion li vidis tie. Treege plaĉis

al li la malnovaj, belaj konstruaĵoj en la centro de la urbo, kaj pri la botanika ĝardeno li skribis laŭdegajn vortojn. Laŭ li eble la plej bela ĝi estas en tuta

Sed pleje li entuziasmiĝis pri la vigla kultura vivo, kaj li miregis, konstatante, ke en mia urbo ekzistas du teatroj kaj du operejoj...

Li skribis pri la muzeoj, universitatoj, memkompreneble pri la Filharmonio lin invitinta, kaj pri ĉio menciinda, kiu tiutempe troviĝis en mia urbo.

Eŭropo. Sed pleje li entuziasmiĝis pri la vigla kultura vivo, kaj li miregis, konstatante, ke en mia urbo ekzistas du teatroj kaj du operejoj, la rumana kaj la hungara. Li skribis pri la muzeoj, universitatoj, memkompreneble pri la Filharmonio lin invitinta, kaj pri ĉio menciinda, kiu tiutempe troviĝis en mia urbo.

Nur la Pupteatron li forgesis menci!

Mi koleriĝis! Ĝuste tiam nia Pupteatro gajnis la unuan premion ĉe la Internacia Pupfestivalo (PIF) en Zagrebo, kaj li eĉ ne mencias, ke ĝi ekzistas! Preskaŭ bolis mia kapo pro nervozeco. Post unu netradormita, aŭ nur duontradormita nokto, mi decidis skribi al li leteron. Tre ĝentile kaj estimoplene mi elektis la vortojn; ja mi ne volis ofendi lin. Mi sciigis lin pri la ekzisto de nia Pupteatro; mi ankaŭ menciis la gajnitajn premiojn. Respondon mi ne atendis, nek tion, ke li prezentiĝu en la Pupteatro.

Sekvantan tagon ni devis prezenti spektaklon, kaj poste provi alian spektaklon por la baldaŭa premiero. Inter la spektaklo kaj la provo ni havis paŭzon, kaj miaj gekolegoj iris trinki kafon en proksima kafejo. Mi kun kolemino res-



tis en la postkulisa ejo, kies pordo restis malfermita por aerumi ĝin.

Kaj jen, sur la sojlo subite aperis belega viro. Lia hararo estis jam arĝentgriza, sed videblis, ke iam ĝi estis orblonda. Liaj anĝelbluaj okuloj ridete rigardis al ni du. Mia kolemino ŝtoniĝis, kiam ŝi aŭdis lian peton: nome, li serĉis min! Preskaŭ tuj mi divenis, ke li devas esti la gastigata dirigento! Do, li ricevis



mian neatenditan leteron – kaj evidente ĝi akiris lian scivolon: kiu povas esti tiu sinjorino, kiu aŭdacas lin kritiki, ĉar li ne menciis en la artikolo la ekziston de Pupteatro!?

Mi montris al li la scenejon kaj la salonegon por la publiko, sed ankaŭ la laborejojn, kie oni aranĝas la dekoraciojn kaj kudras la pupojn. Ĉio tre plaĉis al li. Tre li miris kaj admiris nian Pupteatron. Atente li aŭskultis mian rakonton pri nia teatro, pri niaj spektakloj enlandaj kaj eksterlandaj, niaj partoprenoj en Pupfestivaloj kaj la gajnitaj premioj. Fine li pardonpetis, ke li ne menciis nin, sed li eĉ ne povis imagi, ke ĉi tie ekzistas tiel serioza laboro! Mirigite li aŭskultis, ke ni pupistoj celas eduki la infanojn, distrante ilin! Tiuj 3-4-5-jaraj infanoj ĉi tie en la Pupteatro renkontiĝas ja la unuan fojon kun ĉiuspecaj artoj: literaturo, muziko, pentraĵoj, skulptaĵoj!

Fine li invitis min al la koncerto. Mi dankis, sed sciigis lin, ke mi havas abonon por ĉiu vendreda koncerto de la Filharmonio. Mi promesis, ke mi serĉos lin antaŭ la koncerto.

Post la paŭzo mia kolemino rakontis al ĉiuj gekolegoj, ke mi havis gaston, belegan viron! Ĉiuj moketis min pro la nekutima okazintaĵo.

Vespere, bele vestita, mi iris al la koncerto. Mi rapidis pli ol kutime, por ke mi povu eniri, kaj laŭ la promeso ni povu ankoraŭfoje renkontiĝi. Mi alportis al li kelkajn donacetojn, kelkajn fotojn pri la Pupteatro kaj la pupoj.

Nigrevestita, kiel la dirigentoj ĝenerale kutimas vestiĝi, kun neĝoblanka freŝe gladita ĉemizo, li estis vere belega, tre alloga viro. Ankoraŭfoje li tre dankis, ke mi matene prezentis al li nian Pupteatron; li danke akceptis miajn donacetojn kaj rakontis al mi, ke li havas edzinon kaj du infanojn. Nu, mi eĉ sekundon ne pensis, ke nia renkontiĝo havos iun ajn sekvon: ja li estis fama dirigento kaj belega viro, dum mi, kompatinda, estis simpla pupaktorino en urbeto; aldone la manko en mi de elstara beleco tute ne permesis al mi esperi pri io ajn.

Ni adiaŭis. Mi okupis mian sidlokon ĉe la etaĝo en la lasta vico, kie la akustiko estis la plej perfekta. Kun forte batanta koro mi atendis la komencon de la koncerto.

Grandega estis la senreviĝo! Nur kelkaj minutoj sufiĉis: vane li estis renomata eŭropa dirigento: li tutsimple ne kapablis gvidi orkestron! Ne nur mi konstatis tion! Ĉiuj ĉeestantoj miregis kaj konsterniĝis, spertante ne ĉiutagan eventon: *la orkestro gvidas la dirigenton!* Ankaŭ mi la unuan kaj solan fojon

spertis tian strangaĵon. Kvazaŭ marionetpupo, li movis siajn brakojn laŭ la ludantaj muzikistoj. Je lia granda bonŝanco la orkestro estis vere profesie altnivela: spite al ĉio, ĝi sukcesis savi la koncerton!

Tamen dum la paŭzo duono de la publiko foriris. Ankaŭ mi volonte estus foririnta, sed mia scivolo estis tro granda; tial mi restis ĝis la fino.

La dua parto estis eĉ pli peniga. La orkestro emis ludi iom pli rapide, sed li restis ĉiam malfruiga. Tiam okazis vere eksterordinara kozo! La muzikistoj ne plu interesiĝis pri la dirigento. Neniu plu rigardis al li kaj al liaj vane svingataj brakoj. Liaj belaj, longfingraj manoj, kiel lacaj birdoj, naĝadis en la aero. Sed ili jam iĝis tute superfluaĵ! La orkestro sendependiĝis. De tempo al tempo ili rigardis al la koncertmajstro (la unua violonisto), kaj ĉio pluiris glate. Ĝis tiam ili estis ludintaj malcerte, vane atendante la dirigentan geston, sed nun ili ekludis memstare, sekure, perfekte. Tiel bone evidentiĝis ilia bravega talenta plenumado, ke senescepte la aŭskultantaro ĝin rimarkis kaj je la fino premiis per tondra eĥanta aplaŭdo. La kompatinda dirigento ne rimarkis, ke la aplaŭdojn ne li meritis, sed la orkestro! Dignoplene li dankis per elegantaj riverencoj. Sed kiam li malaperis, kaj nur la orkestro restis sur la scenejo, la tuta publiko ekstaris kaj freneze ovaciis ĝin.

Kun feliĉa sento Georgo forlasis nian urbon! Neniam plu mi vidis lin, nek aŭdis pri li. Poste mi parolis kun kelkaj muzikistoj de la orkestro, kaj mi demandis ilin, kial fakte oni invitis lin? La respondo: pro lia tre bona renomo! Oni diris pri li, ke li estas unu el la plej talentaj eksterlandaj dirigentoj vivantaj en Britio! Unu el miaj amikoj-muzikistoj, trafa ŝercemulo, diris: „Georgo trifoje estis invitita al nia urbo: la *unuan fojon*, la *lastan fojon*, la *‘neniam plu’ fojon*.” Tia estis la muzika memorŝtono de la bela Georgo.

Julia SIGMOND

Surpriza proverbaro

Kia patro, tia filo. En la jaro 1905 Marko Zamenhof, la patro de pli konata filo, komencis la eldonadon de *Frazeologio Rusa-Pola-Germana-Franca*. Kvin jarojn poste la filo publikigis la *Proverbaron Esperantan* kiel aldonon al tiu kvarlingva kontribuo al la kompara proverbologio. La patro tiam, bedaŭrinde, jam forpasis, kaj lia verko preskaŭ forgesita restas nun sen represoj. La verko de la filo trafis pli favoran akcepton kaj estis plurfoje represita, tiel ke hodiaŭ facilas mendi aŭ elŝuti ĝin.

Multaj esperantaj aŭtoroj, inter ili gravuloj, kiel Waringhien kaj ambaŭ fratoj Rossetti, substrekis la gravecon de la *Proverbaro* kaj utiligis – fojfoje kun admirinda originaleco – la zamenhofajn proverbojn en la propra verkaro. Ĉio ĉi faras el la *Proverbaro* nepran legendaĵon por ĉiu amanto de beletra internacilingva.

Estis do la iniciatinto de la esperantaj lingvo kaj literaturo mem, kiu, influate de la patro, lanĉis per la multinflua *Proverbaro esperanta* la ĝenron de esperantaj proverbaj kolektoj. Alia menciinda nomo estas tiu de Lucien Bourgois, kiu aŭtoris *Proverbaron francan-esperantan* (1985, kun Georges Lagrange) kaj, bedaŭrige malampleksan, *Kvarlingvan proverbaron* (2000), en kiu kolektiĝas 482 proverboj francaj, anglaj, germanaj kaj esperantaj. Sed, verŝajne, la plej grava – kvankam laŭ mia scio ĝis nun senrecenza – verko post la zamenhofa estas la ducentpaĝa kolekto redaktita de Erkki Röntynen, *Proverbaro – nia komuna heredaĵo* (1999), entenanta pli ol 3700 proverbojn el la tuta mondo.

Al tiu ĉi tradicio nun sin aldonas eksplicite la *Proverbaro tutmonda* de André Cherpillod, jam per sia titolo klara aludo al la zamenhofa *Proverbaro esperanta*.

Kiel moton por la verko Cherpillod – bone konata eks-akademiano, verkinto de multaj informaj broŝuroj pri lingvaj kaj historiaj temoj, aŭtoro de seso da malpli konataj literaturaj tradukoj – elektis „Konado de proverboj estas necesa por perfekta konado de la lingvo”, citaĵon el la unua antaŭparolo de la zamenhofa proverbaro. (Kvankam tiu antaŭparolo estis subskribita „M. F. Zamenhof”, Cherpillod atribuas la eldiron al Ludoviko, mi ne kapablas diri, ĉu prave.)

Proverbaro tutmonda

Sub tiu titolo estas proponata al ni 150-paĝa listigo de iom pli ol naŭcent esperantaj proverboj; ĉiun el ili sekvas ekvivalentoj – iufoje nur unu aŭ du, iufoje pluraj dekoj da ili – en diversaj lingvoj. Kiam necese, la aŭtoro aldonis al nacilingva proverbo laŭvortan esperantigon. Enkonduke la aŭtoro prezentas tripaĝan studeton pri la ĉefaj trajtoj, kiuj diferencigas la proverban lingvaĵon disde la ordinara; li distingas ses tiajn trajtojn kaj aldonas konsiderindan kvanton da ekzemplaj proverboj. Fine de la libro ni trovas suplemente paĝon da diverslingvaj langrompiloj kaj palindromoj.

Pri la proverbokatalogo mem: sian naŭcenton da esperantaj proverboj Cherpillod ĉerpis ne nur el la zamenhofa proverbaro (tiu cetere enhavas 2630 erojn, el kiuj multajn konsistigas ripetiĝoj aŭ simplaj dirmanieroj), sed ankaŭ el la cetera verkaro de Zamenhof, el la Biblio, el PIV, el la verkoj de gravaj aŭtoroj, kiel Cezaro Rossetti, Raymond Schwartz kaj Marjorie Boulton. Por liveri la nacilingvajn ekvivalentojn la aŭtoro disponis pri tuta internacia teamo de 22 personoj, inter ili Baldur Ragnarsson; el tiu kun-

laboro rezultis la arigo de proksimume 4000 proverboj en pli ol 90 lingvoj.

Tio ŝajnas grandega sukceso, kaj estas evidente jam unuavide, ke tiu ĉi broŝuro ekestis nur sekve de multaj laŭdindaj klopodoj fare de la nelacigebla Cherpillod kaj lia tutmonda kunhulpantaro. Tamen estas necese fari gravan rimarkigon, nome ke la tutmonda kunhulpantaro estas preskaŭ tute eŭropa laŭ nacieco.

Malgraŭ tiu fundamenta eŭropeco de la proverbaro ja troviĝas en ĝi konsiderinda nombro da proverboj en tiaj lingvoj kiel la vjetnama, la svahila kaj la aramea. Estas, tamen, neeble ignori la fakton, ke – kiel la aŭtoro mem konfesas – kelkaj lingvoj estas reprezentataj multe pli abunde ol la aliaj: la angla, la franca kaj la germana svarmas tra la tuta libro, dum, ekzemple, la cigana lingvo ludas rolon apenaŭ rimarkeblan. Ne ŝajnas al mi, ke ni vidu tion kiel severan kulpiĝon: ni nur konsideru, ke, se ĉiuj lingvoj estus same bone reprezentataj, kiel la franca, ni ricevus ne plu broŝuron, sed multegekostan libron plurvoluman! Kaj por tia giganta projekto, bedaŭrinde, ne troveblas en Esperantujo eldonisto, nek publiko ...


La *Proverbaro tutmonda* estas grava kontribuo al la proverbologia literaturo en Esperanto kaj povas kompariĝi laŭ graveco kun la kolekto de Röntynen. Estas esperinde, ke tiu ĉi verko (kaj tiu ĉi recenzo, eble) instigos ankaŭ aŭtorojn kun aliaj lingvaj, geografiaj kaj kulturaj fonoj al la esplorado de tiu ĉi interesa tereno kaj prezentado al ni de novaj surprizaj proverbaroj el ĉiuj partoj de la mondo.

Andreo LOVANIENSIS

André Cherpillod: *Proverbaro tutmonda. Kelkaj miloj da proverboj el 90 lingvoj*. Eld. La Blanchetière, Courgenard, 2010. 157 paĝoj broŝurita. ISBN 2-906134-89-9.

Prezo ĉe FEL: 13,50 eŭroj + af franko.

Belaj figoj post Pasko



Kiam la redakcia sekretario de MONATO proponis al mi, ke mi recenzu la prestiĝan *Lingvo kaj Menso* de Noam Chomsky [ĉomski] en traduko de Edmund Grimley Evans, mi sentis min kvazaŭ elementa instruisto pri matematiko, al kiu oni petas komentariojn Ejnŝtejnnon ... ĉar almenaŭ en Eŭropo Ĉomski estas konsiderata iu duondio. Do ... mi hezitis.

Eskapo el premo

Sed ... mi pripensis, ke fakte ne estos mia tasko komentarioj la tekston de Ĉomski! Mi prijuĝu la esperantan eldonon, la tradukon de Evans do. Nu, tio estas rapide kaj facile farebla! La traduko estas tutsimple perfekta, modela kaj senripoĉa. Plie ĝi aspektas facila. Tio signifas: dum la legado la novaj terminoj (novaj, ĉar plejparte ne jam antaŭe troveblaj en publikaĵoj) neniel ĝenas,

Nur unu solan terminon mi renkontis, kiu ne tute plaĉis al mi, por kiu mi pensis havi pli bonan solvon. Laŭdirinde estas, ke ĉiuj titoloj de cititaj libroj kaj artikoloj ricevis apudan esperantan tradukon, kaj mi povas certigi, ke estas aparte malfacile kaj riske traduki titolojn.

neniel bremsas la legadon, donas do impreson de facileco, de natureco; la uzitaj terminoj do certe estas bonaj. Nur unu solan terminon mi renkontis, kiu ne tute plaĉis al mi, por kiu mi pensis havi pli bonan solvon. Laŭdirinde estas, ke ĉiuj titoloj de cititaj libroj kaj artikoloj ricevis apudan esperantan tradukon, kaj mi povas certigi, ke estas aparte malfacile kaj riske traduki titolojn.

Perlo de estonta kompleta ŝnuro

La libro estas (kompreneble?) tradukita en multajn lingvojn. Nederlanda traduko aperis jam en 1970. (Inter krampoj: Se la angla estas vere la I.L. kaj se vere ĉiuj lingvistoj perfekte regas ĝin, kial oni tradukis la libron? Pripensu foje, kaj vi komprenos, ke mi metis iun adverbbon, en antaŭa frazo, inter krampoj.). Do nun ankaŭ en Esperanton, kiel dua (post Darvino) en la serio *Scienca Penso*, kaj mi pensas – ĉar ne ĉiuj esperantistoj scias la anglan, kaj do ne ĉiuj esperantistoj estas lingvistoj – ke ĝi meritas tiun honoron. Mi volas, cetere, kun miro kaj admiro, emfazi, ke temas pri vera „libro” laŭ la vidpunkto de bibliofilo. Ĝi estas ne glubindita, ne kvazaŭbindita, sed vere bindita kaj konsistas el sep kunkudritaj ka-

jeroj (en la ne-PIV-a signifo de „parto de ... kaj ene de ... libro”), kio estas raraĵo nuntempe. Interalie, tial mi uzis antaŭe la adjektivon „prestiĝan”, do ne nur pro la enhavo.

Ĉio estas relativa en la mondo

En mia lingvika laboro dum la pasintaj jaroj mi konstatis, ke la duondieco de Ĉomski estas precipe eŭropa, ĉar en Usono liaj kontraŭuloj, ofte eĉ nepre malamiko, estas multnombraj. Ne nur ĉar „neniu estas profeto en sia urbeto”, sed oni, ŝajnas al mi, ankaŭ projekcias sian politikan kontraŭecon sur lin. Ĉar oni ne simpatias kun liaj politikaj ideoj (estas konate, ke Ĉomski ne estas tajloro, kiu restas ĉe sia laboro), oni deziras ofte eĉ ridindigi lian profesion laboron. Mi trovis, en Interreto, en usonaj recenzoj, multe pli da atakaj recenzoj pri liaj verkoj ol da laŭdaj. Pri unu kritiko mi tamen samopiniis.

Mi pekas nun kontraŭ mia decido ne preparoli la ĉomskian enhavon. Ĉiu el la sep ĉapitroj estas teksto de iu el liaj publikaj prelegoj universitataj. Mi estas certa, ke liaj prelegoj estis tre sukcesaj ... ĉar kiel prelegoj ili estas absolute nekompreneblaj, kaj ĝuste tiaj prele-

goj estas plej sukcesaj en universitatoj. Ju malpli oni komprenas, des pli oni laŭdas (admiru mian intelektan povon!). Aliflanke ... se vi malrapide digestante legas, relegas kaj studas la tekstojn... vi malkovros trezorejon de perloj, kiuj kuniĝas en brilantan ĉenaron ... eĉ se vi poste, en aliaj ĉapitroj, konstatos, ke vi povos, kiel Ĉomski mem faris, ordigi ilin en alia maniero, por konstrui alian same admirindan ĉenaron. Kiel en matematiko, oni ankaŭ en la ĉomskia sistemo nepre devas konstrui sian konon ĉeneron post ĉenero, ĉar ĉiu ĉenero bezonas la

toĵ el la teorio de Ĉomski, kaj do certe la libro ne estas resumo de ĝi.

La vangoj de la truto

Sed eĉ se vi ne kutimas iam ajn legi enkondukojn, mi konsilas al vi nun, tamen, legi la treege gravajn, interesajn kaj instruajn specialajn antaŭparolojn de tiu ĉi esperanta traduko. Se laŭ la kutima diraĵo „la veneno sidas en la vosto”, tiam nepre en la malvosto sidas malveneno; ĉi tie la komenco vere estas la ĉerizo sur la torto! Tre interese kaj unike estas, ke, denove danke al nia lingvo, du

**Aliflanke ...
se vi malrapide digestante legas, relegas kaj studas
la tekstojn...
vi malkovros trezorejon de perloj,
kiuj kuniĝas en brilantan ĉenaron ...**

antaŭan por fiksiĝi. Ĉomski ja proksimas la idealon de spirita edziĝo inter matematiko kaj lingviko. Ankaŭ se vi iam en universitato studis la ĉomskiajn teoriojn, vi komprenos pli bone, vi eble finfine komprenos, nepre pli funde komprenos lian rezonadon, eble eĉ danke al la tutesperanta teksto. Simpla legaĵo ĝi ne estas, kaj la libro certe ne legiĝas kiel romano.

Nuneca eldono

La apero de la libro en Esperanto certe ne estas „figoj post Pasko”. La traduko estas farita laŭ la tria eldono (2006) de la originalo (1967). Kaj la dato 2006 estas grava, ĉar tiu ĉi eldono enhavas kvar novajn ĉapitrojn. En tiu maniero vi povos sekvi la evoluon de la teorioj, kaj vi povos demandi al vi mem, kial vi ne mem faris la evoluajn rezonojn, kiujn Ĉomski skizas en la lastaj ĉapitroj. Evans ankaŭ tradukis kaj enmetis la antaŭparolojn de ambaŭ antaŭaj eldonoj. Kvankam mi mem estus preferinta tradukon de *Sintaksaj strukturoj* (1957), mi pensas, ke por ĝenerala publiko tiu ĉi libro estas pli taŭga, ĉar plejparte ĝi traktas problemojn, kiuj ne estas pure kaj nure lingvikaj. La tekstoj estas par-

lingvistoj el tre malsamaj regionoj, kaj apartenantaj al lingvaj familioj, kiuj ne ĉiam sentas sin tre komfortaj en ĉomskia medio, verkis tre legindajn kaj valorajn enkondukajn tekstojn. La hinda profesoro Probal Dasgupta verkis pri *La internacia lingvo kaj universala gramatiko* kaj la japana profesoro Hiroshi Nagata verkis pri *La evoluo de la ĉefaj tezoj de Chomsky*. Interesa en la kontribuo de la japana profesoro estas la kelkfoja uzo de „alproksimiga tempa korelativo”, nome, „ĉi tiam”. Kiel vi tradukos la paron „ĉi tiam” kaj „tiam” en vian nacian lingvon? Ĉu „ĉi tiam” = „nun”? En la teksto mi ĉiuokaze ne povus anstataŭigi la „ĉi-tiam”-ojn per „nun”-oj, kaj la vortkombino havas signifon kaj sencon en la frazoj. Mi ne scias, ĉu oni donis anglalingvajn tradukojn de ambaŭ artikoloj al Ĉomski, sed mi esperas ke jes.

Petro De SMET'

Noam Chomsky: *Lingvo kaj menso*. Tr. Edmund Grimley Evans. Serio *Scienca Penso* n-ro 2. Eld. Universala Esperanto-Asocio, Roterdamo, 2010. 188 paĝoj binditaj. ISBN 9789290171140.

Prezo ĉe FEL: 9,90 eŭro + aŭfranko



**La libroj kaj
diskoj recenzitaj
en MONATO
estas mendeblaj
de la Retbutiko
de FEL**

Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen,
Belgio.

tlf. + 32 3 234 34 00
tlk. + 32 3 233 54 33

rete: retbutiko@retbutiko.net
skajpe fel-monato
www.retbutiko.net.

La origino de la homaj lingvoj

Studi la evoluon de la lingvoj strikte science oni povas nur ekde la momento, kiam tiuj lingvoj akiris skribon. Kiel la lingvo evoluis ekde la unua artikigita sono ĝis la apero de la skribo – pri tio oni povas nur konstrui hipotezojn, kiuj povas esti konfirmitaj aŭ refutitaj nur per nerektaj faktoj. Neniaj arkeologiaj esplorfosadoj povas doni rektajn pruvojn. Dubinde ni iam scios, kiel kavernhomoj nomis mamuton, nur se estos inventita la tempomaŝino de Herbert Wells.

La ĉi-suba hipotezo estas bazita sur faktoj, kiuj ekzistas en diversaj lingvoj ĝis la nuna tempo. Kiomgrade plenrajta estas tia aliro? Se iu fenomeno ekzistas en kelkaj, eĉ multaj lingvoj, ĉu oni rajtas konsideri tiun fenomenon universala eco de la homa lingvo? Se mi estas, ekzemple, ruso, mi vidas ke ukrainoj, poloj, bulgaroj parolas multe pli kompreneble ol turkoj aŭ ĉinoj. Fakulo en lingvoj diros: la rusa kaj aliaj similaj al ĝi lingvoj formas la slavan grupon. En Eŭropo kaj Azio ekzistas ankaŭ aliaj lingvaj grupoj: ĝermana, romida, kelta, hinda, irana.

Uzante la ekziston de tiuj grupoj, oni povus konstrui pseŭdosciencajn teoriojn. Ekzemple, se la difina artikolo ekzistas en ĉiuj romidaj lingvoj, en ĉiuj ĝermanaj kaj ankoraŭ en la araba kaj la hebrea, en la greka kaj la hungara, en la bulgara kaj la makedona, do, tio estas universala lingva leĝo, kaj se iu lingvo ne havas artikolojn, ĝi estas ankoraŭ ne sufiĉe evoluinta.

Kompreneble, tio estas neserioza kaj nescienca. Jes, iu fenomeno povas esti en lingvoj de unu aŭ du grupoj kaj plene

foresti en ĉiuj aliaj lingvoj de la mondo. Por ke oni povu konfirmi universalecon de iu fenomeno, ĝi devas esti en granda nombro de neparencaj lingvoj.

ungegojn kaj kojnodentojn, fortajn muskolojn, rapidajn gambojn, povis ĉasi, lukti, defendi sin nur kunigite, grege. Kaj por tio ili bezonis almenaŭ mini-

**Se iu fenomeno ekzistas en kelkaj,
eĉ multaj lingvoj,
ĉu oni rajtas konsideri tiun fenomenon
universala eco
de la homa lingvo?**

Travidebla origino

La origino de la lingvoj de sama grupo estas por la scienco pli aŭ malpli travidebla. Ekzemple, ĉiuj latinidaj lingvoj originis de la popola latino jam en la historia epoko, post la disfalo de la romia imperio. Ankaŭ la slavaj lingvoj originas de iu unu lingvo, sed ĝia nomo kaj ĝia skribo (kiu plej verŝajne ne ekzistis) ne konserviĝis. Ankaŭ ĉiuj hindeŭropaj lingvoj originis de unu lingvo (science: pralingvo). Ĝia nomo des pli ne konserviĝis, kvankam iuj teoriaj rekonstruaĵoj ekzistas ankaŭ por ĝi. Kiel en tiu lingvo sonis (proksimume antaŭ 5000 jaroj) la vorto „ŝafo”, sciencistoj pli aŭ malpli certe scias.

Imperativo de singularo

La lingvo embriiĝis, laŭ opinio de la aŭtoro, de verbo, de ĝia primara formo: imperativo de singularo. Argumentoj estos sube, kaj antaŭ ĉio ni imagu situacion de la ŝtonepoko. La tiama homo devis ĉasi, defendi sin kontraŭ rabobestoj kaj lukti kontraŭ malamikoj.

La prahomoj, kiuj ne havis akrajn

muman interŝanĝon de informo. Sed kia informo estis la plej necesa? Por ke agoj dum ĉasado, batalo, defendo kontraŭ superanta per forto besto estu sukcesaj, ĉiuj devis agi interkonsente. Kaj por tio estis bezonataj komandoj, kiuj venus de la grega estro aŭ de la plej proksima najbaro. Komence tio estis neartikigitaj elkrioj (kiel krias boksisto, faranta frapon), kaj poste ĉiam pli kaj pli konsciaj. Tiajn diversformajn signalojn-komandojn havas ĉiuj gregaj animaloj inkluzive birdojn, kiuj havas malpli evoluantan cerbon ol mamuloj.

Iom post iom (pasis ja miloj kaj dekmiloj da jaroj) tiuj signaloj-komandoj iĝis ĉiam pli kaj pli artikigitaj kaj diversaj, kio helpis resti viva al *Homo sapiens*, estaĵo multe pli malforta ol leonoj, tigroj kaj ursoj.

Primaraj verboj

Kiaj povis esti tiuj signaloj-komandoj, kiam ili iĝis jam artikigitaj? „Bat!”, „Frap!”, „Stop!”, „Vid!”, „Don!”, „Pren!”, „Ven!” kaj similaj. Tio estis primaraj verboj, laŭ nuntempa kompreno

en imperativo de la dua persono de singularo. Nerektaj faktoj donas motivojn opinii, ke de tiuj primaraj verboj originis ĉiuj vortoj de ĉiuj lingvoj. Nun neniu povas diri, kiam tiuj primaraj verboj aperis: ĉu antaŭ dekmiloj aŭ centmiloj da jaroj? Sed aperinte en tiuj delonge pasintaj jaroj, tiuj formoj malmulte aliĝis.

En lingvo, same kiel en aliaj homaj agoj, oni povas observi celkonformecon: por kio aliĝi formon de tranĉilo, hakilo aŭ rado, se ili normale plenumas siajn funkciojn? Se estas bezono ordoni, postuli, peti, el ĉiuj ekzistantaj en lingvo verbaj formoj estas plej simple uzi la plej mallongan.

Jen pro tiu kaŭzo ĝis nun en la plimulto de la lingvoj, apartenantaj al diversaj familioj, t.e. kiuj unu kun alia neniam interagis, ni povas observi la saman fenomenon: la plej simpla imperativa formo de verbo ĉiam estas la plej mallonga, kutime ĝi koincidas kun la verba radiko, de kiu formiĝas ĉiuj aliaj verbaj formoj.

Ekzemploj

La germana (la hindeŭropa familio): „*komm*” — „*venu*”

la malaja (la aŭstronezia familio): „*pergi*” — „*iru*”

la kazaha (la turka-tatara familio): „*kel*” — „*venu*”

la mongola (la mongola familio): „*jav*” — „*iru*”

la hungara (la finn-ugra familio): „*varj*” — „*atendu*”

la ĉeĉena (la kaŭkaza familio): „*laĥa*” — „*serĉu*”

la haŭsa (la ĉada familio): „*sa*” — „*metu*”.

Proksimume tiaj estis la unuaj vortoj necesaj dum ĉasado aŭ dum batalo. Sed la ĉasado kaj la batalo okupis ne la tutan tempon de la prahomo. Post tio li venis en sian kavernon, kaj estis neceso preparoli la pasintan ĉason aŭ batalon. Por tio oni bezonis uzi verbojn ne nur en la imperativa formo, sed ankaŭ en la is-tempo, la prezenco, la futuro kaj en diversaj personoj (mi, vi, li). Tiel la verbo akiris tempojn, aperis pronomoj, personaj nomoj.

Do, verboj, pronomoj kaj personaj nomoj. Sed kio pri aliaj gramatikaj vortklasoj? La plimulto el ili originis de verboj. Kaj ĝis la nuntempo oni povas tion observi en multaj lingvoj. Ekzemple,

en la germana: „*lesen*” — „*legi*”, „*Lesen*” — „*legado*”, „*gehen*” — „*iri*”, „*Gehen*” — „*irado*”; en la angla „*swim*” povas signifi kaj „*naĝi*”, kaj „*naĝado*”; en la hinda „*khana*” signifas „*manĝi*” kaj „*manĝaĵo*”.

Sed ĉiuj ĉi estas hindeŭropaj lingvoj, kaj kiel estas en aliaj familioj? En la araba (la semida familio) la plimulto de la vortoj estas konsiderataj esti derivaĵoj de verboj. Ekzemple, estas en la araba la verbo „*kataba*” — „*skribi*”. De ĝi formiĝis: la deverba substantivo „*kitab*” — „*libro*”, la aktiva participo „*katib*” — „*skribanta*” (t. e. „*skribisto*”, „*sekretario*”), la pasiva participo „*maktub*” — „*skribita*” (t. e. „*letero*”) ktp.

En la ĉina lingvo (la ĉina-tibeta familio) ne ekzistas diferenco inter verboj kaj adjektivoj. Tiel „*hong*” povas signifi „*ruĝa*”, „*ruĝiĝi*”, „*esti ruĝa*”. Ankaŭ en la korea (izolita lingvo, ne apartenanta al iu ajn familio) verbo kaj adjektivo estas nedistingeblaj: „*phungsong-hada*” signifas „*riĉa*” kaj „*esti riĉa*”.

Japana adjektivo (la japana estas izolita, senfamilia lingvo) havas la samajn gramatikajn kategoriojn, kiujn havas verbo: „*yoi*” — „*bona*”, „*estas bona*”, „*yokatta*” — „*estis bona*”, „*yokereba*” — „*se estas bona*”. Kaj mongola substantivo povas havi tempojn kiel verbo (la mongola lingvo apartenas al la samnoma familio).

En la tagala (la aŭstronezia familio) gramatikaj vortklasoj distingiĝas tute aliel, ol ekzemple en eŭropaj lingvoj, t.e. kun niaj nocioj de substantivo, verbo, adjektivo aliro al tagalaj vortoj estas neebla. La plimulto de la vortoj en tiu lingvo estas aktivaj kaj pasivaj participoj, t.e. verbaj formoj.

Oni povus plimultigi similajn argumentojn, sed ili jam nenion aldonos al la supre priskribita tezo.

Mihail KOROTKOV



Dubinde ni iam scios, kiel kavernhomoj nomis mamuton, nur se estos inventita la tempomaŝino de Herbert Wells.

La aŭtoro petas ĉiujn, kiuj interesiĝas pri la problemoj, sendi faktoj kaj konsiderojn, kiuj konfirmas aŭ dementas la hipotezon, laŭ la adreso: mich_kor@mail.ru.

Terasa apartamento

Estas landoj en Eŭropo kaj en la cetera mondo, en kiuj oni rajtas aldoni neniun modifon al sia domo sen permeso. Oni riskas pli-malpli salitan monpunon. Tute ne en Kipro, vera paradizo el tiu ĉi vidpunkto.

Observu la belan dometon en la foto: ne, ne temas pri fotomuntaĵo, kaj – estu trankvilaj! – vi ne suferas je halucinoj. Iu kiprano, prave aŭ malprave ekkonsciiginte, ke li bezonas pli spacohavan loĝejon, iris iun belan tagon al vendejo de antaŭpretigitaj konstruaĵoj, akiris unu el ili kaj ĵetegis ĝin sur la ebenan tegmenton de sia domo. Bonvolu ne demandi min kiel: mi supozas, ke per helikoptero aŭ levitacio – malpli probable per katapulto, kiun oni ne ofte vidas sur la insulo. Eble iutage la mistero de la egiptaj piramidoj malkovriĝos, kaj tiam

ni komprenos.

Ĉiuokaze la viro solvis la problemon simple, rapide, efike kaj malmultekoste. Nun li vivigas sian familion treege pli komforte kaj finfine povis dungi servistinojn el ... Ŝri-lanko¹ (en Kipro tiu ĉi estas rangosimbolo: ĉiu respektinda hejmo devas havi, almenaŭ sur la tegmento, tian servistinojn). Ŝi neniam kaj nenial plendu, ĉar oni disponigis al ŝi terasan apartamenton kun spirhaltiga panoramo, kaj, se ŝi sendanke ne ŝatas tion, ŝi retroiru al sia lando!

Tiaj dometoj ekaperas pli kaj pli ofte kiel fungoj en ĉiu kvartalo. La najbaroj? Ili ne priatentas kaj trankvile dormas. „Konstrua senrajteco” estas aliflanke esprime, kiu troveblas tradukita en neniun vortaro de la kipra dialekto. Nenio cetera konstruiĝis de iu. Oni nur akiris kaj

poste apogis domon sur alian domon. Tute aliaj estas la problemoj de Kipro, oni scias: juraj konfliktoj kun Turkio, senlaboreco, prezaltiĝo. La unusolaj perpleksuloj estas mia edzino kaj mi. Ankaŭ ni – kiel pluraj servistinoj el Ŝri-lanko – estas vere sendankuloj: matene ni ĝuas senpage tiel agrablan panoramon vidalvide de nia balkono, kaj ni rigardas ĝin abomenaĵo ... Antaŭ ol ekdormi, ĉiuvespere ni kune preĝas, por ke almenaŭ neniuj el la kunposedantoj enkapigu al si malfermi diskotekon, noktan klubon aŭ lignometiejon – Dio savu kaj protektu nin almenaŭ de tio! – super nia dormoĉambro.

Roberto Pigro

¹ Kun ŝ, laŭ la loka prononco



anoncetoj

Vizitu Ipernity, la socian retejon, kie Esperanto estas unu el la plej ofte uzataj lingvoj. En ĝi kelkaj miloj da Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.iper-nity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete: www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provkzemplerio. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei libroliston laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

**MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA**

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp



Ĉu vi jam legis?



Plej furoris en 2010

1. Trevor Steele: Flugi kun kakatuoj
2. La jaro 2011
3. Alexandre Dumas: La grafo de Monte-Kristo
4. Trevor Steele: Kvazaŭ ĉio dependus de mi
5. Willem Elsschot: Kiel vaglumoj
6. Anna Löwenstein: Morto de artisto
7. Anna Löwenstein: La ŝtona urbo
8. Wandel/Galadi: La kosmo kaj ni
9. Ilustrita oficiala radikaro
10. Lidia Zamenhof: Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj
11. Charles Darwin: La origino de specioj
12. Stefan MacGill: Nemave edifi
13. Katalin Kovacs: Poŝamiko
14. Willy Vandersteen: La brusela bubo
15. Van Damme kaj De Vleminck: Grammaire ABC
16. Jean Codjo: Aventuro en mondo de ŝajnigado
17. Maria Becker: Internacie kuiri
18. Antoine de Saint-Exupéry: La eta princo
19. Ziko van Dijk: Informado praktike
20. Carlo Collodi: La aventuroj de Pinokjo

La jenaj 20 verkoj en la Butiko de Flandra Esperanto-Ligo plej furoris en 2010. Pliajn informojn kaj mendilon vi trovos en www.retbutiko.net, sed vi povas kompreneble skribi ankaŭ per la „klasika poŝto” al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.